


KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Sadretdinova Naila [Voronej, Rusio]

Sunetoj

2004

Kiel Osmo Buller, direktoro de CO de UEA iĝis esperantisto
originala poezio — aventura rakonto "Mistera rideto" — gramatiko serioze
kaj amuze — neelpensitaj historioj — ludoj por gaja kompanio — saĝaj
pensoj orientaj — anekdotoj — prezentado de Go-ludo — korespondu!

2

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central. AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000. Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Strážnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037. Beijing

~ S-ro Cui Jiayou, P.O.Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 -- 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamichenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004. Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA14, 6D. ES-40006. Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Branković

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105. ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugallio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckevagen 29, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

En viaj manoj estas la dua numero de "K-2004" Ĝi venis al vi jam somere, kiam varma aero kaj brilantaj sunaj radioj vokas ridetojn kaj gajigas humoron. Tial sur la kovrilpaĝo vin ĝoje renkontas sunetaj ridetoj.

Heroo de nia konstanta rubriko "Kiel tio komenciĝis" estas nova-malnova Direktoro de Centra Oficejo de UEA s-ro Osmo Buller.

Sur la poeziaj paĝoj vi trovos poemetojn sub la komuna devizo "Liriko de varmaj tagoj" de aŭtoroj el Francio, Rusio kaj Nederlando. Sur la najbara paĝo vi legos gajan poemon el Germanio "La birdonupto", kiu similas al infana kanzono kaj kiun oni povas uzi kiel instruilon.

Ĉi-numere ni daŭrigas *orientan direkton* kaj vin atendas aventura rakonto "Mistera rideto" de japana aŭtoro *Iama Sciuro*, brile intermiksita pere de versaĵoj de K. Kalocsay. Surloke de aforismoj ĉi foje estas "Saĝaj pensoj orientaj" kun diraĵoj el Konfuceo.

S-ro *Nabuo Sakurai* el Tokio, Prezidanto de "Esperantista Go-Ligo Internacia" prezentas al ni tiun interesan orientan ludon - Goo, rakontas ĝiajn regulojn kaj donas ekzercojn.

En la gramatikaj paĝoj sekvas daŭrigo de prilingvaj esploroj, tradukitaj se *S. Pahomov* "Lingvo kaj tempo".

Ĉe la paĝo 11 ni lanĉas novan rubrikon pri amasaj ludoj, distraj kaj instruaj. Ni esperas, ke la temo vokos intereson kaj vi rakontos siavice pri ludoj, kiujn ŝatas vi.

"Neelpensitaj historioj", "Anekdotoj" kaj "Korespondu!" atendas vian atenton sur siaj kutimaj lokoj. Skribu al ni!

Agrablan legadon!

KOMENCANTO

2004 numero 2 // (46) // 6 numeroj jare regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavceva
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2004:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: **vkud-a**

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

Sola kondiĉo - nepre menci **KOMENCANTO**'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo de UEA

Mi fariĝis vera esperantisto jam kiel lerneja knabo



pentris M. Habibpoor [Irano]

Unuaj paŝoj en mirinda mondo. Kiam mi estis juna knabo, mi ofte vidis informojn pri Esperanto. Ĉar mi interesiĝis pri lingvoj kaj pri novaj aferoj ĝenerale, mia sinteno al la ideo pri facila internacia lingvo certe estis pozitiva ekde la unua fojo, kiam mi legis pri Esperanto. Mi eklernis ĝin, kiam mi estis 15-jara. La decidan puŝon donis unu el miaj hobiaj, aŭskultado de eksterlandaj radiostacioj. Ĉar mi scipovis nur la finnan lingvon, mi povis sekvi nur la programojn de tiuj stacioj, kiuj dissendis en la finna. Unu el ili estis la Pola Radio. Okazis, ke ĝia finna elsendo komenciĝis tuj post la Esperanta elsendo. Por ne perdi la komencon de la finna elsendo mi serĉis la ondolongon de Varsovio en mia radioricevilo tiel frue, ke mi ofte aŭdis la vortojn: "Finiĝas nia elsendo en Esperanto." Tiel mi malkovris, ke Esperanto estas vivanta lingvo, ĉar ne estus radioprogramoj en ĝi, se ili ne havus aŭskultantojn. En gazeto de finnaj DX-aŭskultantoj mi legis, ke ankaŭ aliaj stacioj elsendas en Esperanto. Mi jam sciis, ke Esperanton oni povas lerni rapide. Do, mi tuj eklernu ĝin kaj baldaŭ estos pli da radioprogramoj, kiujn mi povos aŭskulti kaj kompreni!

Mi iris al la librovendejo de mia vilaĝo kaj diris al ĝia posedantino, ke mi volas lerni Esperanton kaj bezonas lernilon. Ŝi esploris en katalogoj kaj trovis la titolon de "Esperantokurso", malgranda libreto de Vilho Setälä, kies lecionoj estas popolaj fabeloj. Mi petis ŝin mendi du ekzemplerojn, ĉar mia plej bona amiko el la sama lerneja klaso volis studi kun mi. Baldaŭ la libretoj alvenis kaj la 6-an

de januaro 1966 mi povis eklerni. Bedaŭrinde la fervoro de mia muzikema amiko daŭris nur du-tri monatojn, ĝis li ŝanĝis Esperanton al ludado en rokbandoj.

Du jarojn poste mi membriĝis en UEA. Mi havis plurajn hobiajn kaj membriĝis en koncerna organizaĵo de ĉiu el ili. Finnoj estas organizigemaj, do ankaŭ mi. En la kazo de miaj aliaj hobiaj mi estis membro de loka sekcio, sed kiel esperantisto mi volis rekte aparteni al la monda organizaĵo. Kiam mi skribis al la ĉefdelegito de UEA por demandi pri la membrototizo, mi ne kuraĝis skribi Esperante, ĉar mi timis, ke estus honto fari erarojn en leteroj al tiel grava homo. Li respondis en Esperanto kaj diris, ke mi ĉiam skribu Esperante, ĉar nur tiel mi ellernos la lingvon. En la tago, kiam mi ricevis mian unuan Jarlibron, tiun de la jaro 1968, mi estis plena de fiero. Mi tralegis ĝin ekde la unua ĝis la lasta paĝo, ankaŭ la adresojn de la delegitoj, kaj mi sentis esti membro de nova, mirinda mondo. Jarlibro 1969 jam estis pli normala afero kaj en ĝi mi legis nur la informojn, kiujn mi bezonis.

Unu el la utilaj informoj de la Jarlibro temis pri Koresponda Servo Mondskala de UEA. Pere de ĝi mi ricevis adresojn de junaj esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Francio, Japanio kaj Sud-Koreio. Mi vigle korespondis kun ili. Unu el ili nun estas elstara movadano, nome Sibayama Zyun'iti, kiu estas prezidanto de Japana Esperanto-Instituto.

En la jaro 1969 la 54-a Universala Kongreso okazis en Helsinko, la ĉefurbo de mia lando. Jam en la antaŭa jaro mi aliĝis al ĝi kaj ekŝparis por partopreni ĝin. Estis granda aventuro por mi, ĉar eĉ en Helsinko mi neniam antaŭe estis. Mi ankaŭ ne havis sperton pri interparolado en Esperanto, ĉar ĝis tiam mi povis konversacii kun neniu. Mia sola sperto estis la aŭskultado de radioelsendoj. Kiam mi venis al la kongresejo, mi vidis la plej eminentan finnan esperantiston, akademianon Vilho Setälä antaŭ la ĉefa enirejo. En tiu momento mi decidis, ke li estu la

unua, kun kiu mi parolos en Esperanto. Estis ja ĝuste li, per kies lernolibro mi lernis la lingvon. Mi longe pripensis miajn frazojn, kolektis la kuraĝon, iris al li kaj diris: "Bonan tagon! Mi ĉus venis kaj ne scias, kion mi devas fari." Setälä montris ĝiceton, kie oni disdonis kongresajn dokumentojn. Poste li demandis, el kiu lando mi estas. Mi diris mian nomon kaj ke mi estas finno. Tuj li memoris, ke mi jam verkis recenzon pri la libro "Vivo de Gandhi" de E. Privat por "Esperanta Finnlando", kies redaktoro li estis, kaj li laŭdis ĝin. Tiel promesplene komenciĝis neforgesebla semajno, dum kiu mi renkontis samideanojn el multaj landoj. Ĉar miaj oreloj jam alkutimiĝis al radioelsendoj, mi senprobleme komprenis ĉion kaj mia propra parolkapablo rapide progresis. Plej multe da tempo mi pasigis kun japanoj, ĉar ili estis por mi, kampara knabo, io unika kaj neniam spertita. Eĉ kun Ivo Lapenna mi parolis. En tiu semajno mi vere eniris Esperantujon.

Antaŭ la UK mi skribis unuafoje al la Pola Radio, kvankam mi estis ĝia aŭskultanto jam longe. Mi rakontis, ke mi fariĝis esperantisto dank' al la Pola Radio. Je mia granda surprizo mia letero estis premiita kiel la plej interesa letero de la monato. La premio estis la verko "La faraono" de la pola aŭtoro Prus en la fama traduko de Kabe. Antaŭ ol vojaĝi al mia unua UK mi tralegis ĝin. Ĝi estas atentokapta verko kaj facile legebla. Kiam mi legis ĝin, mi uzis "metodon", kiun mi uzis ankaŭ ĉe aliaj libroj kaj artikoloj. Nome, se mi renkontis nekonatajn vortojn, mi ne tuj rigardis en la vortaro, sed mi plu legis. Kiam mi fine interrompis la legadon, mi klopodis memori la novajn vortojn kaj nur tiam mi serĉis ilian signifon en vortaro. Ofte la vortoj tiel ofte ripeziĝis, ke mi malkovris ilian signifon dum la legado. Multajn jarojn poste, kiam mi laboris en la Centra Oficejo de UEA, mi legis, ke en la antaŭmilita laborista Esperanto-movado de Nederlando oni diris, ke por esti vera esperantisto necesas legi "La faraonon". Mi ĝojis konstati, ke mi fariĝis vera esperantisto jam kiel lerneja knabo!

Liriko de varmaj tagoj

Yves Brusq [Douarnenez, Francio]

Somero


La parfumo de la floroj
 Envolvas la kampoj
 Kiuj kuras sub la nuboj
 Senmovaj sur la ĉielo
 Blua kaj kvieta
 Kiel la maro sube.

*

Ne urĝu vin
 kaj rigardadu
 la herberon
 ĉe via sojlo
 kaj la roson
 sur la herbero.

*

Pura somernokto
 Kantas la grilo.
 Aŭ eble estas feino
 ŝirmita de la roso
 sub fungo?



Nina Vinnikova [Novoaltajsk, Rusio]

Aleksandr Morev [Puŝkin, Rusio]

Apud vojo - domoj, domoj
 Kaj fenestroj kiel ĉenoj.
 Tie loĝas - homoj, homoj
 Kun esperoj kaj ĉagrenoj.
 Kaj sur stratoj - rojoj, rojoj.
 Jen printempo ĉe la pordo.
 Min atendas - vojoj, vojoj
 Kaj en fin' – feliĉa bordo.
 Min pardonu - homoj, homoj,
 Ke mi devas resti sola.
 Estu vi en - domoj, domoj
 Kaj por mi - silento mola.

Anneke Buys [Apeldoorn, Nederlando]

Somera ĝuo

kulaj piedoj igas tremi skue
 vian haŭton:
 tiel plume malpeza, tiel
 penetre
 ĉeesta.

Ombro

Ombro biciklas kun vi.
 Jen vi estas kampulino
 jen ciganin'.
 La ombro sin etendas kaj
 vi estas pentraj' de Picasso;
 ĝi ŝrumpas ĝis nenio
 vi rajdas trans ĝi:
 eta flako nigra
 tuj sub vi.

Verkis **Cezaro** [Altenburg, Germanio]

La Birdonupto

(laŭ la ideo de germana kanto el la 16-a jarcento)

La nupton festas birdoparo
meze de l' arbaro.

Fidirallala, fidirallala,
fidiralla-lala-la.

La gufo estas la fianĉ',
la strig' la fianĉin'.

Parigas la paruo,
ŝin svatas al la duo.

La cigno, la cigno,
jen staras kiel signo.

Ansero, ansero,
kunblekis kun fiero.

Kardelo, kardelo,
kondukas al kapelo.

La pego, la pego,
jam frapas ĉe l' pordego.

Pastoro akcipitro
demandas de l' pupitro.

La fringoj, la fringoj
atendas kun la ringoj.

Kolibro, kolibro,
flirtegas sur l' nuptlibro.

Alaŭdo, alaŭdo,
ĝi zorgas por aplaŭdo.


Strigpanjo, strigpanjo
ploregas pro l' infanjo.

Fulmaro, fulmaro,
gratulas al la paro.

La najtingal', la najtingal'
reĝine kantas ĉe la bal'.

Kukolo, kukolo,
ĝi petas al dancsolo.

La struto, la struto,
paradas kun la fluto.



Pirola, pirola
vetkantas kun parvolo.

Kolombo, kolombo,
ĝi kveras en la rondo.

La kampokorv', la kampokorv',
atendas pri muzik' de Orff.

Vesperto, vesperto,
ĝi dormas dum koncerto.

Pingveno, pingveno,
kelneras kun malbeno.

La ruĝgorĝul', la ruĝgorĝul',
gustumis tro de l' alkuhuul'.

Paseroj, paseroj,
satiĝas de l' manĝeroj.

Koturno, koturno,
donacas kun la sturno.

Hirundo, hirundo,
hezitas jam de lundo.

La pigo, la pigo,
ĝi ŝtelas pro intrigo.

Papago, papago,
papagas pro la pago.

La festo, festo,
finiĝas en la nesto.

Noktuo, noktuo
ululas por la duo.

La mevoj, la mevoj,
vojaĝas jam en revoj.

Iama Sciuro
[Japanio]

Vinnikova Nina [N. Altajsk, Rusio]



Mistera Rideto

Fininte laboron ĉe Esperanto-Domo, mi ekveturis reveni hejmen. Kiel ĉiuj tre okupataj mi kutimis legi libron en vagono. Estis malfruc vespere kaj la vagono ne estis tiel homplena kiel en la tagaj horoj. Mi facile trovis sidejon kaj ekokupis ĝin. Mi malfermis Libron de Amo kaj komencis legi Sekretajn Sonetojn de Peter Peneter. Por mi, lacigita pro tro da laboro, tiuj minutoj de legado en vagono estis vere refreŝigaj.

Mi sidigis apud junulinon ĉirkaŭ dudekjaran, elegante vestitan per blanka robo. Ŝi havis en la mano bukedon el rozoj. Supozeble ŝi ĉeestis edziĝan festenon de ŝia amikino. Aŭ se la blanka robo ne konvenas al edziĝa festeno de la amikino, eble ian gratulan balon por ŝi. Ŝajnis, ke ŝi ĝentile kapklinetis al mi kun afabla rideto. Povas esti studentino de universitato, ĉar ŝi aspektis tre inteligenta kun klaraj okuloj. Mi komencis legi la daŭrigon de la antaŭa tago.

Oni prezentis min “Ho, la poeto!”
vi diris kun ekbrilo de okul’;
kaj ni sidigis flanke en angul’,
tuj konsentante: “Teda societo”.

Kaj vi babilis dolĉe, kun rideto,
la tempo pasis kun rapida rul’,
kaj mia koro, pro l’ kreskanta brul’,
fajrerojn ŝutis kiel la raketo.

Mi estis sprita. Trilis via rido,
sonore, kiel la arĝenta kord’,
kaj mia Bubo dume, kun insido,

frapetis sur la pantalona pord’,
levante ĝin je eta piramido.
Ĝi evidente celis al rekord’.

Mia najbarino daŭre ridetadis al mi dolĉe.
Estas strange. Kial ŝi estas tiel afabla al mi? Ĉu ŝin
interesas io mia? Sed bone. Estas diversaj virinoj.
Mi daŭrigu legadon.

Bruegis ĝaje jam la societo.
Pro miaj vortoj, pro l’ ioma trink’
vizaĝon vian per natura ŝmink’
koloris jam facila ebrieto.

Kaj dum en dolĉincita malkvieto
nin ĉirkaŭbaris kvazaŭ sorĉa ring’,
jen, sian kapon kun subita sving’
ekmovis mia vira amuleto.

Vi ĝuste alrigardis, kaj ekvidis,
ke sin balancas mia amkompas’,
kaj forrigardi vane vi rapidis:

La lipomordo, arda cmarbas’,
okuloj nebulitaj vin perfidis:
Vi sentis ĝin penetri kun frakas’!

Ŝia mistera rideto ne malaperas. Ŝajnas, ke
ŝi ridetas rigardante mian libron. Ĉu ŝi kompresas
ĝin? Ĉi ŝi vere komprenas tiajn senhontajn liniojn?
Ĉu ŝi estas esperantistino? Mi ektimas. Sed ne? ne
faru trorapidan konkludon. Pro ŝia eleganta
vestaĵo, oni facile povas konstati, ke ŝi estas
tokianino. Kaj se ŝi estas tokia esperantistino, estas
strange, ke mi neniam vidis ŝin en ia esperanta
kunveno. Ĉu ŝi estas nur komencanto? Sed
komencanto certe ne povas kompreni tian libron,
kian mi nun legas.

Mi daŭrigu legadon.

El garmofon’ sinkopis, disonancis
kaj plandojn tiklis la jazbanda bru’.
“Ni dancu!” Dancis ni kun granda ĝu’,
la lulajn koksojn rave vi balancis.

Miksiĝis spir’ al spiro, dum ni dancis,
Kaj mi premiĝis en ardanta glu’
al viaj sorĉaj pelvo kaj genu’.
Ebruis ni. La Bub’ eĉ plie prancis.

Mi sentis, ke sur via brust’ sin levis
du dolĉaj pintoj kun ekscita ŝvel’,
kaj mia pranca ŝvelo preskaŭ krevis.

La koro batis en freneza pel’.
Mi amis jam, kaj ĝin sigeli devis:
sur la kalsono restis la sigel’.

Ankoraŭ ŝi rigardis mian libron kun dolĉa rideto. Ĉu ŝi komprenas? Ne, ne, nekredeble! Ĉu mi aŭdace provu alparoli ŝin en Esperanto por solvi la enigmon? Ŝi ne povas esti esperantistino.

La hejma balo estis jam finita.
Mi akompanis vin dum hejmenir',
kaj antaŭ pordo, ĉe l' adiaŭdir'
mankise dankis vin pro l' vort' invita.

Ho, dolĉa morgaŭ! Rava tag' vizita!
Mi hejmeniris kvazaŭ en delir',
duone senkonscie pro l' sopir',
al fraŭla ĉambro, al la lit' ermita.

Kaj hejme mi rigardis kaj gratulis
la Bubon, kaj dum dolĉa rememor'
vizio sorĉa antaŭ mi nebulis:

en lit' vi interpretis kun langvor'
per la femuroj lokon, kiu brulis
kaj larmis pro la pafo de Amor'.

Ho, estas feliĉe, ke ŝi ne komprenas tiajn sen-
prudajn liniojn.


La postan tagon iris mi vizite,
prezentis min, laŭ etiket-regul'
al famili', sed, kvazaŭ somnambul',
mi rigardetis sole vin, ravite.

Vi havis ĝuste gastojn. Kaj subite,
jen, ree sidis ni en la angul',
kaj mia dekstra man' kun trema brul'
en vian manon sin alŝtelis glite.

Kaj dum sekrete ĉirkaŭ mia fingro
fermiĝis via man' kaj ĝis radik'
ĝin ĉirkaŭpremis kvazaŭ arda ringo,

tra nia spino vibris dolĉa pik'
pro tiu kuŝ' en humidvarma ingo,
pro l' erotike arda simbolik'.

Kaj tamen kial do ŝi ankoraŭ ridetas rigar-
dante mian libron? Kaj tia dolĉe alloga rideto! Ĉu
ŝi volas allogi min? Ĉu vere ŝi intencas allogi min?
Ĉu mi ricevas tian honoron de tia ĉarma fraŭlino?
Jes, devas esti. Alie kiel solvi la enigmon de ŝia
mistera rideto? Ĉu ŝi do ne kolerus, se mi prenis
ŝian manon? Ĉu mi provu kurage? Ŝi jam atendas
tion, ĉu ne? Ha, ne pcnsu pri stultaĵo, sed daŭrigu
legadon.



Kononova Sneĵana [N. Onka, Rusio]

Ho, sopirata horo rendevua
en maja bosko! Kaj dum la promen'
en kaŝa loko trema ĉirkaŭpren'
kaj longa, longa, longa kis' unua.

Ho, se mi kisus al la najbarino la buŝon! Jes, certe
ŝi permesus al mi tion.

Kaj kiso dua, tria, kvara, plua!
Malŝpara dono kaj avida pren'!
Al mia korpo en duona sven'
alpremis sin la dolĉa korpo glua.

Ho, se ŝi alpremus sian korpon al la mia. Nu,
jen, mi sentas kvazaŭ ŝi alpremas sian korpon al la
mia. Sendube ŝi intencas allogi min. Mi sentas varmon
de ŝia korpo. Mi sentas eĉ la altan batadon de ŝia koro.
Ha, stultulo. Tio estas nur iluzio. Daŭrigu!

Gluiĝis al mi via dolĉa ventro,
kaj sub ĝi, kun ekstaza fandiĝem',
tra l' vestoj via plej sekreta Centro

bruliĝis, alpremiĝis ĝis ekstrem'.
Ekstaze dum ĉi sorĉa korpkoncentro
mi helpis vin de poste, per manprem'.

Subite mia najbarino ekstaris, kaj ekiris al la
pordo de la vagono. Tiam mi rimarkis, ke la vagonaro
atingis stacion. Nur post paŭzeto mi elreviĝis kaj ri-
markis, ke la stacio estas la fina, nome Tokio.

Ĉiuj pasaĝeroj jam elvagoniĝis. Mi rekonsciigis
kaj rapide elirinte el la vagono, mi serĉis vane per ne-
certaj okuloj la blankan robon de la najbarino, kiu
tamen jam malaperis de la kajo. Mi hejmeniris kun
ebria kapo plenplena je la bildo de la mirinde alloga
rideto de la junulino.

Nur reveninte hejmen, mi malkovris la veran
kaŭzon de ŝia miastera rideto. Mia edzino rimarkigis
kun krio: "Hontu! Via pantalononfendo estas malfer-
mita kaj la interno estas preskaŭ videbla...!"

Vladimir Plungian'
Elrusigis Sergej Pahomov [Kirov,
Rusio]

Lingvo kaj tempo

Espereble vi jam al kutimiĝis, ke en lingvoj estas multe da enigmoj. Tial vi ne miru, se mi diros, ke lingvoj konstante ŝanĝiĝas. Pasas iom da tempo (1om" por lingvo estas 100 aŭ 200 jaroj) kaj la lingvo iĝas jam ne tia, kia ĝi estis.

Pasas ankoraŭ iom da tempo, kaj la lingvo ŝanĝiĝas ankoraŭ pli.

Kaj fine, se ni komparu la lingvon, kia ĝi estis ekzemple antaŭ 800 jaroj, ni simple ne kredos, ke povas okazi tiom da transformiĝoj, kaj praavo kaj la ido estas tute diversaj lingvoj.

Tiel okazas ĉiam kaj ĉie, kun ĉiu lingvo, nur iuj el lingvoj ŝanĝiĝas malplirapide ol la aliaj. Tamen transformoj estas neeviteblaj. Kaj tio estas la leĝo. Prenu por ekzemplo eĉ vian gepatran lingvon, la nunan kaj el 18-19-aj jarcentoj, aŭ ankoraŭ la pli antikvan, kaj komparu ilin.

La transformiĝoj en la lingvoj pasas kiel en la sencoj, tiel ankaŭ en la prononcado de la vortoj.

La transformoj de sencoj de vortoj

La plej evidenta kaj la plej ofta speco de transformoj estas sekva: vortoj perdas antaŭan sencion, kaj akiras la novan. Post tio la vorto estos uzata kun la nova senco aŭ la vorto malaperas. Ekzemple, en unu versaĵo de A. S. Puŝkin estas frazo: "Carino malbona minacas al ŝi per *rogatka*". Dum tempo de A. S. Puŝkin la vorto *rogatka* signifis: "speciala kateno por kolo de eventuala viktimo". Nun la objekto en tiu senco eĉ ne estas konata, tamen la vorton *rogatka* nun estas ofte uzata de knaboj por nomi "gumkatapulton", ĝi similas al Y-litero.

A.S. Puŝkin ofte uzis anstataŭ la nunaj vortoj:

lob (frunto), palcy (fingroj), ŝĉoki (vangoj)

la vortojn: ĉelo, persty, lanity, sed la partoj de la homa korpo restas senŝanĝaj ekde pratempo. Dum tempoj iuj objektoj, kiu ĉirkaŭas homojn, malaperas, sed iuj aliaj novaj aperas kaj homoj nomas ilin pere de novaj vortoj. *Viva tempolimo de ĉiu ajn vorto en ĉiu ajn lingvo estas limigita*, ĉu frue, ĉu malfrue ĉiu vorto malaperas, cedante sian lokon por alia vorto. Ofte okazas, ke tiu nova vorto estas prenita el alia lingvo, kutime el la lingvo de najbara popolo, aŭ el vaste vastigita lingvo (por konkreta epoko). Tiaj vortoj nomiĝas *prunteprenoj*.

Prunteprenoj

Pri iuj vortoj ni mem komprenas, ke ili estas "fremdaj": ĉar ili, tiel diri, vivas en nia lingvo kiel gastoj, duon-fremdlandanoj. Precipe tiuspecaj vortoj eniris nian lingvon antaŭnelonge. Ĉiu rusoj scias, ke vortoj, ekzemple, *eksperiment* aŭ *kompanjon* aŭ eĉ pli freŝa *kompjuter* ne estas rusdevenaj. Estas interese, ke iam la rusa prunteprenis la sekvajn vortojn:
— *bludo* (plado), *bukva* (litero), *izba* (kabano), *osjol* (azeno) el antikva germana lingvo;
— *gramota* (legoscio), *svekla* (beto), *tetradj* (kajero) el la greka;
— *baŝmak* (ŝuo), *kolĉan* (sagujo), *loŝadj* (ĉevalo) el turkaj lingvoj.

En ĉiu lingvo estas multe da prunteprenoj: lingvoj kiuj vivas apude, najbaras, facile penetras unu el la alian kaj interŝanĝas per siaj vortoj. Pri francaj prunteprenoj el la angla ni jam parolis [vidu "K"-1], sed ankaŭ en la moderna franca (same en multaj aliaj lingvoj) nun estas multaj anglaj prunteprenoj.

Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj

Ekzemple estas kurioza historio de la vorto *ŝapka* (ĉapo). Antaŭ iom da jarcentoj la vorton prunteprenis la rusa (trans pola kaj germana) el la franca (la malnova formo estis *chape* sed la nuntempa estas *chapeau*) en la senco "la kapvesto laŭ Europa modelo". Tamen pli malfrue la franca mem prunteprenis la vorton el la rusa: nun en la franca apud la vorto *chapeau* estas la vorto *chapka*, kiu signifas.. varman kapveston el felo "laŭ rusa modelo"! La kazo ne estas malofita, estas multaj ekzemploj, kiam lingvoj interŝanĝas je la sama vorto alterne.

Kial la vortoj ne estas eterne en lingvo? Kiom daŭras "viva tempolimo" de vorto? Ĉu por ĉiuj vortoj ĝi estas la sama? Estas tre interesaj demandoj, sed bedaŭrinde lingvistoj ne havas ĝustajn respondojn.

Oni povas nur difinitive diri: diversaj vortoj havas diversajn tempolimojn de vivo.


Ĉiu lingvo havas sian grupon de "vortoj-longvivantoj", kaj en multaj lingvoj "la longvivantoj" iĝas vortoj proksimaj laŭsence, ekzemple:

patro, patrino, akvo, ŝtono, koro, blanka, trinki, du, tri, .. kelkaj aliaj.

Interalie, oni rimarkis, ke la vorto *unu* vivas en lingvoj pli mallonge, ol la vorto *du*, kaj la vorto *bona* pli mallonge ol la vorto *nova*.

Antaŭ 50 jaroj usona lingvisto *Moris Svadesh* atentinte la observojn de aliaj lingvistoj, esploris multe da lingvoj kaj faris la liston de cent la plej "stabilaj" vortoj. La vortoj el la listo malaperas el lingvoj tre malrapide: ekzemple, dum mil jaroj averaĝe malaperas nur proksimume 15 vortoj el 100.

Ŝanĝoj de sencoj, aperado kaj malaperado de novaj vortoj estas tre gravaj ŝanĝoj en lingvo. Sed krom tiuj ŝanĝoj de senco ekzistas ankoraŭ alispeca transformiĝo.



Bill Thorne [Londono, Britio]

La transformoj en prononcado de vortoj

Okazas tiel, ke vorto povas konservi dum longa tempo sian sencion, sed ŝanĝi sian sonadon. La sama vorto komencas prononciĝi iom alie, kun aliaj sonoj aŭ sen iuj sonoj: kvazaŭ ili estas englutataj, aŭ forviŝataj. Simile al transformiĝoj de sencoj transformoj de sonado ankaŭ daŭras malrapide. En lingvoj ekzistas periodoj de “sona trankvilo”, dum 300-500 jaroj sen iuj rimarkindaj ŝanĝoj, sed okazas periodoj de “sonaj tempestoj”, kiam dum 150-300 jaroj lingvo ŝanĝiĝas nere-koneble. “La tempestaj” periodoj en historio de lingvo ofte koincidas kun tempestaj periodoj en historio de la popolo, parolanta en la lingvo (konkeroj, transloĝiĝoj, dissolvado inter aliaj popoloj ktp.), sed tio ne nepras.

En historio de, ekzemple, rusa lingvo la tempesta epoko okazis en 12-14-aj jarcentoj (dum tatar-mongola invado kaj fondo de Moskva ŝtato, la ŝlosila periodo de rusia historio). Poste alvenis epoko de relativa trankvileco kaj glataj, apenaŭ rimarkindaj ŝanĝoj. Rusa lingvo de la 18-a jarcento ĝenerale jam estas preskaŭ la moderna rusa. Kvankam multajn dokumentojn el la 15-a jarcento nuna ruso komprenos sen traduko (tio ne estas pli komplike, ol kompreni belorusajn tekstojn). Tamen la rusa de la 11-12-aj jarcentoj por nuntempaj rusoj jam estas komplika, iusence kvazaŭ fremdlingvo. En ĝi estas multaj nekonataj vortoj, eĉ konataj sonas alie. Io simila okazadas ne nur al la rusa, sed ankaŭ al ĉiuj lingvoj.

Por ĉiu ajn lingvo la ŝanĝoj de sonoj ludas gravan rolon. Rigardu ankoraŭfoje la tabulon [vidu “K”-1], kie estas la anglaj kaj francaj vortoj. Vi vidis, kiom granda diferenco estas en la prononcado de la Malnov-francaj (proksimume 11-12 j.) kaj la modernaj francaj vortoj. La franca ortografio “rigidiĝis” ie en la nivelo de la 16-17-aj jarcentoj aŭ eĉ pli frue.

LINGVAJ RESPONDOJ L. L. Zamenhof

Pri “Neniigi”

Ĉiuj vortoj de “interrilata tabelo” konsistas el du partoj: a) radiko, b) karakteriza finiĝo (ekzemple: ki-al, ki-o, neni-u, neni-a k.t.p.). Ĉar pro diversaj kaŭzoj, pri kiuj me ne povas nun paroli detale, la karakterizaj finiĝoj de la diritaj vortoj ne povis esti fiksitaj kiel finiĝoj *sendependaj* kaj *ĝeneralaj* (ekzemple mi estis devigita preni la finiĝon *e* kaj *u*, kiuj kiel sendependaj finiĝoj havis jam alian sencion), tial mi devis aliroĉi ilin

nedisigeble al la radiko. Tiamaniere ilia uzado *sendependa* (ekzemple en formoj “ali-u”, “ali-es”, “kelk-om”, k.t.p., kiuj per gramatika instinkto estis uzataj de kelkaj Esperantistoj) estas kontraŭregula. Sed en tiuj du kolonoj, kiuj finiĝas per *a* kaj *o*, la finiĝoj estas ne kondiĉe interrilitaj, sed pure *adjektivaj* kaj pure *substantivaj*, kvankam ili, pro unuformeco, estas presataj en la vortaro kune kun la radiko (oni povas tamen tre bone presi ilin ankaŭ sen la finiĝo). Tial la forĵetado de la pure substantiva *o* kaj ĝia anstataŭigado per diversaj aliaj finiĝoj kaj sufiksoj ŝajnas al mi tre bone permesebla.

Kompreneble, se tio ĉi donus ion *novan*, kontraŭan al la ĝisnunaj kutimoj, ni devus tion ĉi eviti, ĉar absoluta kaj laŭlitera reguleco tion ĉi ne permesus; sed, ĉar la vorto “neniigi” kaj “neniĝi” estas jam de longa tempo tre bone konataj kaj uzataj de ĉiuj Esperantistoj, tial mi opinias, ke malpermesi la uzadon de tiu ĉi formo estus tute senbezone.

Respondo 14, *La Revuo*, 1907, Aprilo

Pri “Neniu” kaj “Nenia”

La vorto “neniu” (tiel same, kiel ankaŭ la vortoj “iu”, “kiu”, “tiu”, “ĉiu”) havas sencion pure *pronoman*, dum la vorto “nenia” (kiel ankaŭ “ia”, “kia”, “tia”, “ĉia”) havas sencion *adjektivan* kaj esprimas *specon, karakteron*. La vortoj “iu, kiu, tiu, ĉiu, neniu” povas esti uzataj aŭ *kun* substantivo, aŭ *sen* substantivo (en tiu ĉi lasta okazo oni subkomprenas ĉe ili la vorton “homo”). La formoj kun *u* enhavas en si ĉiam la ideon de nomo aŭ pronomo, dum la formoj kun *a* havas en si ideon de adjektivo. La diferencon inter la diritaj serioj da vortoj vi komprenos plej bone en la sekvantaj ekzemploj:

- *Kiu* venis? - Venis *Petro*; venis botisto, venis li.
- En *kiu* urbo vi loĝas? - Mi loĝas en *Parizo*; mi loĝas en *tiu* ĉi urbo.
- En *kia* urbo vi loĝas? - Mi loĝas en *bela* urbo; en *granda* urbo.
- Ĉu vi vidis la ĉambristinon aŭ kuiristinon? - Mi vidis *nenuin* servistinon.
- Ĉu vi vidis *junan* servistinon aŭ *maljunan*? - Mi vidis *nenian* servistinon.

Inter la vortoj “tiu-tia” kaj “ĉiu-ĉia” la diferenco estas pli granda kaj pli klara, ol inter la vortoj “kiu-kia”, “iu-ia”, “neniu-nenia”; tial oni neniam povas diri “tia” aŭ “ĉia” anstataŭ “tiu” aŭ “ĉiu”, sed ofte oni povas sen eraro diri “ia, kia, nenia” anstataŭ “iu, kiu, neniu” (kvankam estas bone ĉiam eviti kiom eble la intermiksadon de tiuj ĉi vortoj).

Respondo 29, *La Revuo*, 1908, Februaro



Neelpensitaj historioj

Kiam mi servis armeon...

Rakontis **Aleksandr Kalaŝnikov** [Tjumenj, Rusio]

Kiam mi servis armeon, okazis al mi jeno. Ĉiuj miaj samregimentuloj sciis, ke mia familinomo estas la sama, kiel ĉe la inventisto de tutmonde fama sovetia mitral-pafilo "aŭtomato de Kalaŝnikov". Mi havas al tiu inventaĵo nenium rilaton, tamen oni ĉiam ŝercis deverskaŭze pri tiu koincido.

Kaj foje ni, soldatoj, ekzercis kun niaj *kalaŝnikov*-oj. Por momento mi lasis la ĉambron kaj mia persona mitral-pafilo restis kuŝi sur tablo. Tiumomente en la ĉambron eniris deĵora oficiro el stabo. Li ekvidis kuŝantan senprizorge mitralon kaj tuj demandis:

— Kies estas la pafilo?

La soldatoj respondis:

— De Kalaŝnikov.

— Mi mem vidas, ke estas pafilo de Kalaŝnikov, mi demandas, al kiu ĝi apartenas?

— Al Kalaŝnikov, - estis denove la respondo.

— Ne faru el mi idioton, kies estas la pafilo?

— Estas pafilo de Kalaŝnikov.

Tiumomente mi revenis en la ĉambron kaj brave raportis al la stab-oficiro:


— Soldato Kalaŝnikov bonorde revenis!



Rakontis al V.K. **Vasily Golovanov** [N.Salda, Rusio]

Kiam mi servis armeon, foje mi kaj alia soldato Viktor deĵoris. Kune kun ni deĵoris nia serĝento Nikolaj. Kaj mi ĵus revenis el mia hejmo, kie dum mallonga forpermeso mi edziĝis. Ĉiuj kolegoj soldatoj kaj oficiroj pri tio eksciis kaj min gratulis... Dum tiu deĵoro subite eniris en la deĵorejon la rotestro kapitano Ĉernov, ankaŭ li gratulis min kaj ĝoje aldonis: "Nun mi scias, kiel vin (min kaj Viktoron) ne intermiksi — vi estas edziĝata, kaj vi (al Viktor) — ne". Kaj foriris.

Ni mirigite rigardis unu al la alia. La afero estas tia, ke ni kun Viktor tute ne similas. Mi estas alta, granda, blonda, kaj Viktor svelta, magra kaj nigrahara. Li ĉiam portas okulvitrojn kaj mi — ne. Ni ne finis miri al tiom stranga metodo de kapitano Ĉernov, kiam nin finbatis repliko de nia serĝento direkte al la foririnta oficiro: "Idioto, estas ja tre facile memorfiksi: Vasily fumas, kaj Viktor — ne".



ambaŭ bildoj de **Bill Thorne** [Londono, Britio]



Neniam parolu kun nekonataj... katoj

Rakontis **Mikaelo Bronŝtejn** en Jek-burg dum E-renkontiĝo "Esperantista Printempo en Uralo". Aŭdis kaj rerakontis V.K.

Mi multe okupiĝas pri tradukado kaj inter ceteraj interesaj momentoj de tiu ĉi afero mi ekbezonis traduki en Esperanton, per kiuj sonoj oni vokas katojn. En la rusa lingvo oni karese prononcas: "Kis-kis-kis..." Evidente tio ne taŭgis, ĉar en Esperanto la radiko "kis-" havas tute klaran signifon, havantan nenium rilaton al la katoj.

Mi komencis esplori, kiel oni vokas al si katojn en aliaj lingvoj. Estis diversaj manieroj, kaj jen mi demandis ĉe mia franca konato, kiel oni faras tion en la franca?

La amiko respondis, ke oni vokas al si la katojn laŭ ties nomoj.

— Bone, - respondis mi, - tiam bonvolu diri, kiel vi, francoj, vokas al si nekonatajn katojn, kies nomojn vi ne konas?

— En Francio oni ne vokas al si nekonatajn katojn, - estis la respondo.

Trovis kaj esperantigis **Aleksej Tibonov** [Pervomajskoje, Rusio]

Onidire vera historio

Ĝeyn Fonda estas granda naturprotektantino. Onidire foje al ŝi okazis jeno: en ĉina restoracio ŝi rifuzis manĝi per manĝbastonetoj el bambuo, kiujn alportis ĉina kelnero. Anstataŭ ilin ŝi elprenis el sia saketo siajn proprajn manĝbastonetojn kaj diris al ĉiuj:

— Ĉu vi iam kalkulis, kiom da bambuo oni forhakas por produkti tiujn manĝbastonetojn? Tial mi ĉiam portas kun mi la plastajn manĝbastonetojn.

Kun tiuj vortoj ŝi montris siajn bastonetojn al la kelnero, ke ankaŭ li hontu. La kelnero, evidente ne tre vigle komprenis la anglan, delikate prenis la bastonetojn el manoj de *Ĝeyn Fonda* kaj afable diris:

— Jes, tiuj estas tre bonaj, multekostaj bastonetoj. El elefanta eburo.

Esperantigis Viktor Stepkov
[Aŝa, Rusio]

Ŝerca terminaro

Aforismo

penso, kiu ne iĝis anekdoto.

Amiko

ĉion pri vi scias, sed tutegale amas vin.

Anĝela karaktero
diabla toleremo.

Apetito

kontraste al malsato ne satigeblas.

Bonŝanco

rezulto de tre diligenta preparado.

Breloko

permesas perdi ĉiujn ŝlosilojn samtempe.

Demokratio

sistemo, kiam plej gravajn decidojn faras la plej ĉefa Demokrato.

Diplomato

dufoje pensas antaŭ diri nenion.

Kuracisto

ne permesas al homo morti per natura morto.

Mono

jen komencas finiĝi, jen finas komenciĝi.

Tempo

estas bona kuracisto sed malbona kosmetikisto.

Vodko

estas 60%-a akvo.

Ludoj por aktiva ripozo

Karaj amikoj! Ni proponas al vi novan direkton – Ludoj por aktiva ripozo. Estas vere bona kutimo distri sin en nia Esperantujo – ludoj en klubkunvenoj, festenoj, renkontiĝoj. Kelkaj ludoj iĝis jam tradiciaj programeroj de esperantistaj kunvenoj. Ofte tiuj ludoj havas ne nur distran, sed ankaŭ instruan karakteron, kio kune portas bonan humoron kaj plezurigan etoson.

Ni komencas kaj invitas vin rakonti pri la ludoj, kiujn vi praktikas en viaj Esperantistaj kluboj, kursoj...



Ludo por interkonatiĝo

Ĝi vere utilas por Interkona Vespero, por bone memorfiksi la nomojn de ĉiuj nekonatoj.

Ĉiuj partoprenantoj staras runde.

Unu el ili nomas sian nomon kaj aldonas laŭ sia plaĉo iun adjektivon al sia nomo, kiu (la adjektivo) komenciĝas je la sama litero, kiel la nomo. Ekzemple: Viktoro verda.

La najbara ludanto laŭte prononcas nomon (kun la adjektivo) ĵus diritan kaj poste nomas sian propran nomon, ankaŭ aldonante iun adjektivon, ekzemple: Aleksandro alta. La tria vica ludanto prononcas la ĵus diritajn: Viktoro verda, Aleksandro alta kaj aldonas sian, ekzemple, Heleno hela. Kaj tiel plu kaj tiel plu. Jen ekzempla ĉeno el kelkaj ĉencroj:

Viktoro verda - Aleksandro alta - Heleno hela - Svetlana saĝa - Georgo granda - Karinjo kara - Marinjo milda - Nikolao nigra...

La efiko de tiu ripetado estas tre granda. La ĉestantoj vole-nevole memorfiksas la nomojn de ĉiuj, ĉar se la ludon partoprenas, ekzemple, 30 personoj, oni prononcas la nomojn po kelkdekfojoj. La ludo estas sufiĉe gaja kaj bone malstreĉigas atmosferon inter la nekonatuloj.

Ĉiuj en ...

Estas tre gaja movigema ludo.

La partoprenantoj sidigas runde sur seĝojn. Povas esti inter 5 kaj 20 personoj. Meze de la rondo staras gvidanto, kiu laŭte diras iujn signojn, kiuj havas kelkaj el la rondsiantoj, ekzemple: "Ĉiuj en bluj ginzoj". Kaj ĉiuj, kiuj trovas ke li aŭ ŝi estas vestita en blua ĝinzo devas tuj eksalti de sur sia seĝo kaj residiĝi al alia malplena seĝo de aliulo en blua ĝinzo, kiu samtempe liberigas sian seĝon.

Tiumomente la gvidanto devas sukcesi okupi ies liberigitan seĝon. Se li tion sukcesos, la ludon plu gvidos iu el malsukcesintaj "bluĝinzuloj", kiu staras meze de la rondo kaj siavice laŭte proponas, ekzemple: "Ĉiuj kun blondaj haroj". Kaj ĉiuj blondharuloj eksaltas kaj rapidas ŝanĝi sian sidlokon kun la alia "blondulo"; tion saman rapidas fari la gvidanto. Rezulte al unu ludanto denove ne sufiĉas seĝloko kaj li restas gvidi la ludon. La komunaj signoj kaj trajtoj povas esti tre diversaj kaj vere spritaj, ekzemple "Ĉiuj, kiuj ŝatas bombonojn"...

Ludo estas tre gaja kaj taŭgas por ajna aĝo.

Sadretidnova Naila [Voroneĵ, Rusio]



ĈINAJ PENSAJ ORIENTAJ

Ĉinaj fabloj kaj fabeletoj

Lanco kaj ŝildo

En foiro nun,
armilisto stulta
vendas ilojn kun
hiperbolo multa.

Jen li prenas lancon:
"Ĝi povas trapenetri
tra ĉiu ŝildo!"

Poste prenas ŝildon:
"Ĝin povas trapenetri
neniu lanco".

Almozulo kaj avarulo

Almozulo almozpetas antaŭ la pordo de avarulo.

"Mi petas iom da viando, fromaĝo aŭ butero."

Avarulo: "Tion mi ne havas."

Almozulo: "Iomete da pano."

Avarulo: "Ankaŭ tion mi ne havas."

Almozulo: "Tason da akvo al mi."

Avarulo: "Eĉ akvon mi ne havas."

Almozulo koleriĝis: "Se vi havas nenion,
iru almozpeti kune kun mi!"

(re)verkitaĵ de Jian Weifan [Ĉinio] en formo de libera rimajo

Konfuceaj saĝecoj

Yves Brusq [Douarnenez, Francio]

La tagon de via naskiĝo ĉiuj ridetis ĉirkaŭ vi, nur vi ploris. Regu vian vivon tiamaniere, ke la tagon de via morto ĉiuj ploros ĉirkaŭ vi, kaj nur vi ridetos.

* * *

Ĉe diversaj principoj ne eblas trovi komunan lingvon.

*

Malsaĝulo plendas, ke homoj ne konas lin, kaj la saĝulo male – ke li ne konas la homojn.

*

La sola vera eraro estas ne korekti siajn faritajn erarojn.

*

Ĉiu povas iĝi nobla homo, necesas nur decidi iĝi tia.

*

Kiel sur la ĉielo ne povas esti du sunoj, tiel ĉe la popolo ne povas esti du gvidantoj.

*

La ora regulo de morala konduto:

Ne faru al homo tion, kion ve ne deziras al si mem.

*

Nobla homo ne emas manĝi ĝissate kaj vivi riĉe. Li rapidas en aferoj, sed malrapidas en paroloj.

*

Estimanta filo estas tiu, kiu ĉagrenigas la gepatrojn eble nur pro malsano...

*

Tiu, kiu lemas sen pensi, trafas en miskomprenon. Tiu, kiu pensas, ne dezirante lerni, trafos en embarason.

Samaga en la venonta jaro

Butikisto ĵus festis unu-jariĝon de sia filino. Tiutage lia amiko venis svati al ŝi bebon je unu jaro pli aĝan ol ŝi. La butikisto diris al sia edzino:

— Nia filino havas nur unu jaron kaj la knabo - jam du, li duoble pli aĝas ol ŝi. Kiam nia filino edziniĝos al li en la aĝo de 20 jaroj, li estos 40-jara. Kiel ni povos edzinigi nian filinon al tiom olda viro?

Lia edzino ride mokis lin:

— Kiel stulta vi estas! Nun nia filino havas unu jaron kaj en la venonta jaro ŝi estos tiom aĝa kiom li.



Humuraĵoj el "Juna Amiko"

Internacia Esperanto-Revuo de ILEI
por lernejoj kaj komencantoj



- Sinjoro instruisto, ĉu oni povas puni iun pro io, kion li ne faris?
- Certe ne, Joĉjo
- Tio estas bona. Mi ne faris la hejman taskon.

Diras unu sinjorino al alia:

- Estas nekredeble, ke via trijara fileto jam legas gazeton?!
- Ne, li ne legas, li solvas krucnigmon.

Eksonoris telefono. La malgranda Petro prenas aŭskultilon kaj diras:
- Paĉjo ne estas hejme, ankaŭ Panjo forestas. Estas ĉi tie nur mi, la avino kaj la kato. Mi estas ankoraŭ malgranda, la avino malbone aŭdas kaj la kato ne scias paroli. Ĝis!

- Pavlo, tiu vazo, kiun vi disrompis, estis el la 17-a jarcento!
- Ho, bone por mi. Mi jam pensis, ke ĝi estis nova.

- Sinjoro, via filo ĵetis ŝtonon al mia aŭto!
- Kaj ĉu li trafis?
- Dank'al Dio, ne!
- En tiu kazo, certe ne estis mia filo.

- Nia hundo estas tiel saĝa ke, kiam ĝi volas iri hejmen, ĝi sonorigas ĉe la pordo.
- Tio estas nenio. Nia hundo havas propran ŝlosilon!

Jubileo. La direktoro de la muzik-lernejo diras al la infanoj:
- Lernantoj, hodiaŭ ni festas naskiĝ-tagon de Wolfgang Amadeus Mozart. Pro respekto al li, hodiaŭ ni ludos nenium lian verkon.

- Se vi bone kondutos vin dum la tuta semajno, mi prenos vin kun mi al la maro en la venonta somero - diras la patrino al la filo.

Se vi finos la lernejaron emnente, ni kune vizitos montaron en la venonta vintro - aldonas la patro.

- Bone, sed kion mi devus nun fari, por ke mi tuj for-iru al kinujo? - demandis la knabo je la fino.

Kolektis kaj esperantigis
Kuznjecov Sergej [Kamishev, Rusio]

Diversaj

En Moskvo pasis la unua kongreso de pesimistoj de Rusio. Oni unuanime decidis ne plu organizi la sekvan kongreson.

Sciencistoj de la tuta mondo denove alarmas. Post la kokina gripo oni malkovris blatan nazkataron, ratan artriton kaj hundan apetiton!

Anonco en gazeto:
"Por tajpado de sekretaj dokumentoj oni bezonas analfabetan tajpiston".


Inventisto prezentas sian novan inventaĵon:

- Mi inventis sistemon, kiu permesas difini la personecon de homo laŭ lia voĉo.

- Estas interese, kaj kion mi devas fari?

- Vi devas klare kaj laŭte diri viajn nomojn kaj familinomon.

Estas bone fari nenion kaj post tio plezure ripozi!



Všivceva Galina [Miass, Rusio]

Redakcio de "Komencanto" petis s-ron Nabuo Sakurai, Prezidanton de Esperantista Go-Ligo Internacia rakonti al niaj legantoj pri Goo — interesa kaj populara ankaŭ inter la esperantistoj ludo.
S-ro N. Sakurai afublis fari tion.

Nabuo Sakurai [Tokio, Japanio]
Prezidanto de Esperantista Go-Ligo Internacia

Skizo de Go-ludo

Go-ludo estas tre malnova kaj populara ludo inter japanoj. Lastatempe okulfrappe multiĝis interesitoj eĉ ekster orientaj landoj. Kredeble en Ĉinio ĝi estis elpensita ege pli antaŭe ol la naskiĝo de Kristo. Antaŭ mil kelkcent jaroj ĝi venis al Japanujo kaj tie havis proprajn progreson kaj furoron.

En la jaro 1979 oni unuafoje organizis la tutmondan turniron de amatoraj go-ludantoj en Tokio. La sekvantan jaron la dua tutmonda turniro sekvis en la sama urbo. Estas notinde, ke la tiama gvidanto de la eŭropaj ĉampionoj, *Karl-Ernst Parch* estis elstara esperantisto.

Esperantistoj aparte kontribuas tutmondiĝon de la ludo. Japanaj esperantistaj go-amantoj havas Japanan Esperantistan Go-Asociacion, kaj antaŭ jaroj estas fondita Esperantista Go-Ligo Internacia, kiu organizas internacian korespondan go-turniron. Ankaŭ ekzistas du lernolibroj pri Goo en Esperanto: "Invito al Go-ludo" kaj "Fundamento de Taktiko kaj Strategio en Go-ludo" verkitaj de japana esperantisto kaj lerta go-ludanto *Minosuke Emori*. Japana Esperantista Go-Asocio havas trimonatan organon "Go-Amiko". Interesitoj povas turni sin al *Nabuo Sakurai*, T.I.P.O Kesto 5197, 100-3191 Japanujo.


"Go-o" bezonas tre simplajn ludilojn, proksimume kvadratan tabulon kaj etajn rondajn ŝtonojn, blankajn kaj nigrajn. Sur la tabulo estas desegnitaj po 19 linioj longitude kaj latitude. Antaŭ la ludkomenco la tabulo estas malplena. Unu post la alia du ludantoj (ĉiam du) metas alterne po unu ŝtono sur la krucpunkton de du linioj. La unua ludanto ĉiam prenas nigran ŝtonon kaj la alia blankan. Jam metitaj ŝtonoj devas ne esti portataj al alia loko nek alia punkto, escepte kiam ili estas forprenitaj de kontraŭulo el sur la tabulo. Ludantoj konkuras okupi sur la tabulo pli grandan teritorion, kiu estas ĉirkaŭita de siaflankaj ŝtonoj. Kiu okupos pli vastan teritorion en la fino, tiu gajnos la ludon. Temas pri totala vasteco.

La reguloj:

La fundamentaj reguloj de Goo konsistas el jenaj kvin.

1. Du ludantoj prenas nigrajn aŭ blankajn ŝtonojn respektive, kaj metas ilin po unu alterne sur krucpunktojn de la linioj.
2. Gajnas la ludon tiu, kiu akiris pli da teritorio.
3. Oni povas kapti ŝtono(j)n de la kontraŭulo ĉirkaŭinte tiu(j)n.
4. Estas malpermesita krucpunkto por meti sub ia kondiĉo.
5. Ekzistas formo, en kiu oni ne povas tuj rekapti kiam ŝtono estas kaptita. (La formo esats nomata "altemekapto")

La regulojn mi klarigos sur diagramoj, provizore kun 9 linioj.




Diagramo 1.


Montras finitan konkuron. Nigro ĉirkaŭis du teritoriojn en supredeksra parto kaj en malsupremaldeksra parto, kaj Blanko ĉirkaŭis ankaŭ du en supremaldeksra kaj malsupredeksra. La konkuro estas decidita per sumo de la poentoj. La poentoj de la teritorio estas nombro de krucpunktoj en la teritorio. Nigro havas 13 poentojn supredeksre kaj 10 poentojn malsupremaldeksre, sume 23 poentojn. Blanko havas 10 poentojn supremaldeksre kaj 4 poentojn malsupredeksre, sume 14 poentojn. 23 minus 14 estas 9, Nigro gajnis la ludon je 9 poentoj.

Kiam ambaŭ ludantoj klopodas plivastigi sian teritorion kaj plimalvastigi kontraŭulan teritorion, okazas batalo kaj konkuro kapti ŝtonojn reciproke.

Diagramo 2.


Por kapti la nigran ŝtonon sufiĉas ŝtopi ĉiujn 4 vojojn markitajn de X per blankaj ŝtonoj.






Diagramo 3

La blanka ŝtono estas jam ŝtopita je 3 vojoj. Se Nigro metas unu pluan ŝtonon sur punkton X, la blanka ŝtono estas kaptita.




Diagramo 4.

Sekve, kiam Nigro ŝtopis ĉiujn vojojn kiel N-1, Nigro povas kapti la blankan ŝtonon deprenante ĝin de sur la tabulo. La deprenita ŝtono estas nomata kaptito. Kiam oni kalkulas poentojn post ludfino, oni povas ŝtopi kontraŭulan teritorion per la kaptitoj, kaj tiel malmultigi la poentojn de kontraŭulo.



Diagramo 5.

Por eskapi de la kaptiĝo de diagramo 4 Blanko devas meti B-1 laŭ la vojo. Nun la blankaj du ŝtonoj akiras vojojn en tri direktojn markitajn per X, kaj sukcesis elgliti de la kaptiĝo.



Diagramo 6.

La blanka ŝtono ĉe la vertico de la tabulo estas kaptataj de du nigraj metoj (a), kaj la blanka ŝtono sur la latero de tabulo estas kaptata de tri nigraj metoj (b). Sin-ligitaj du ŝtonoj estas kaptataj, se la kontraŭulo ŝtopas ĉiujn vojojn de la du ŝtonoj (c).

Bill Thorne



RIMARO

ILO
 aprilo
 argilo
 aŭtomobilo
 azilo
 babilo
 filo
 grilo
 ilo
 konsilo
 krokodilo
 lulilo
 milo
 misilo
 pilo
 profilo
 stilo
 trankvilo
 trilo
 vanilo

IMO
 amino
 cimo
 esprimo
 estimo
 krimo
 kutimo
 limo
 maksimumo
 pavimo
 rimo
 timo
 viktimo

ISMO
 abismo
 altruismo
 antagonismo

IFO
 rifo
 ŝerifo
 tarifo

IŜO
 aŝiso
 fiŝo
 tapiŝo

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 25 jara fraŭlo, komencanto.
Int: ŝako, muziko, ludi gitaron.
Fredrikton estas urbeto en orienta Kanado.

Paul Macpherson

4-58 Carman Ave.

Fredericton NB

Kanado E3A 3X1

citanes26@yahoo.com

Mi estas 58 ja. solulo, sufiĉe E-kapabla, lingvisto, instruisto de la hispana, angla, kaj franca lingvoj. Int: lingvoj, vojaĝoj, beleco de naturo kaj arto, inventspirito de la tekniko, komputilajo, filozofio, pripensoj de la vivsenco. Mi volas korespondi kun sciavidaj homoj.

Claus Winterhoff

Neersener Strasse 18, D - 41564, Kaarst

Germanio

esperantibus@t-online.de

Mi estas 21 jara virino, komencanto. Int: ĉevalrajdo, arkeologio, historio, muziko, pop-kulturo, literaturo.

Erin Edgar

300 Regina Street North

Apartment 2-801,

Waterloo, Ontario

Kanado N2L 4H2

edqamail@sympatico.ca

Mi estas 27 jara viro, altnivela esperantisto.

Int: pacismo, logistiko, astronomio, relativeca fiziko, tradukado, literaturo, muziko, mi volas korespondi kun esperantistoj, kiuj bone regas Esperanton.

Roberto Peres-Franko

540 Memorial Drive 1602

Cambridge,

MA 02139

Usono

roberto@perez-franco.com

Mi estas 17 jara knabino, mezkapabla en Esperanto. Int: filozofio, sociologio, literaturo, alternativa movado, muziko, lingvoj, psikologio.

Beatrice

Parizo,

Francio

beatrice-aa-@wanadoo.fr

Mi estas 45 ja komencantino, dez. kor kun hispanaj e-istoj. Mi partoprenos internacian paleontologian kongreson en Granado, Hispanio en julio.

Nina Donova

pr. Metallurgov 38-165

Krasnojarsk, 660005

Rusio

donova_nb@mail.ru

Mi estas profesoro-emerito. Int: vojaĝoj, geografio, fiziko, matematiko. Nun mi dezirus korespondi kun juna rusa virino por faciligi eventuale la lernadon de la rusa lingvo.

Claude Pierrou

Voie de l'Ardenne 89, B-4053, Embourg

Belgio

clpierrou@tiscalinet.be

Mi volas korespondi rete kun la tuta mondo. Int: muziko, interŝanĝi leterojn.

s-ro Jose Maria Grau

Bonaero

Argentino

josemaria@grau.net.ar

Mi volas korespondi tutmonde kun multaj geamikoj.

Veselka Dimitrova

Iliya Krastenovakov,


14 ap. 11

3000

Vraca

Bulgario

Vajceva Galina [Miass, Rusio]



Araneetoj

Mi estas 19-ja, mi kursas fakultaton pri turismo. Int: komputilajoj, geografio, kulturo, rokmuziko, folkloro muziko, ktp.

s-ro Felipe Queiroz

Rua Dr. Antonio Bento,

106 Bairro Vila Mathias

11075-260. Santos-SP

Brazilo

fo_q@starmedia.com

komencanto@r66.ru

http://Komencanto.narod.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

